

IF 22: Subprogrameroj / Unterprogrammteile AIS-EK

La programo de la *Internaciaj Festivaloj* (IF) direktiĝis ĝis nun **nur** al parolantoj de la *Internacia Lingvo (ILO) de Doktoro Esperanto* kaj al iliaj akompanantoj dezirantaj lerni ILo. Ĝi havis ĉiutage 4 tempotranĉojn: 10–11:30, 13:30–15, 16:30 – 18 kaj 20–21:30 h). Dum ili estis elektebloj inter po 2 – 5 programeroj, kiuj antaŭvidis ĉu nenian lingvokonon (koncertoj, dancado ktp.), ĉu kontentigan komunikadkapablon en ILo. Ĉio ĉi validos ankaŭ por la ĉefprogramo de la 22-a IF.

Ĉifoje AIS kaj Eŭropa Klubo (EK) ofertos en aparta AIS-EK-salono paralelan subprogramon, i.a. cele elprovon de „*plurlingva dialogo*“ sen tradukoj. Ĝi estis proponata de Roland Posner* (fondoprezidanto de la *Internacia Semiotika Asocio*) kaj sugestas respondi en la ial preferata lingvo, kiu ne nepre estas la lingvo uzita de la alparolinto. Oni tamen uzu unu el la lingvoj, kiujn supozeble komprenas ĉiuj partneroj de la koncerna komunikadsituacio.

Tiu ĉi lingvarbazo estos por la AIS-EK-sub-programo minimuma komuna subaro de la oficialaj lingvoj de AIS, de EK, de TAKIS kaj de aliaj partoprenontaj plurlingvaj organizoj: **ILO** kaj la **Germana**. Ĉar almenaŭ 80–90% de la IF-partoprenantoj kontentige regas ambaŭ lingvojn, kaj preskaŭ ĉiuj aliaj bone regas unu kaj eklernis la alian, la eksperimento plej probable sukcesos kaj povos konduki al rekomendo de tia komunikadformo.

Jen kelkaj antaŭviditaj eroj de la dulingva AIS-EK-IF22-subprogramo.

Kion instrui pri Eŭropo pligrandiĝinta kaj pligrandiĝonta? La stato de la projekto „*Eŭropiko*“. (Was soll über das vergrößerte und weiterwachsende Europa unterrichtet werden? Der Stand des Projekts „*Europik*“) – Revolution der Demokratie – Schauplatz Europa nach Scheitern des Verfassungsentwurfs. (Revolucio de la demokratio – scenejo Eŭropo post la fiasko de la konstitucipropono.) – „*Leksikono de eŭropiaj komunikadkibernetikistoj*“. Stato kaj pluevoluigado de kunlaborprojekto de TAKIS, AIS kaj EK. („*Lexikon europischer Kommunikationskybernetiker*“. Stand und Weiterentwicklung eines Kooperationsprojekts von TAKIS, AIS und EK.) – Der Europäische Sprachenatlas. (La eŭropa lingvo-atlaso.) – Informaciteoria kurso en la interreto. Unuaj spertoj kun lingvolimtranspaŝa universitatprojekto. (Ein Informationstheoriekurs im Internet. Erste Erfahrungen mit einem sprachgrenz-übergreifenden Universitätsprojekt.) – Öffentliche Mitgliederversammlung 2005 des Europaklub (Publika membrarkunveno 2005 de Eŭropa Klubo) – La Sibiu programo de Eŭrolingvistiko. (Das Hermannstädter Programm der Eurolinguistik) – Sprachpolitisches Europa-Forum – Welche Koalitionen sind möglich? (Lingvo-politika Eŭropo-Forum – Kiaj koalicioj eblas?). – Diskuto pri reformoj de la AIS-regularoj. (Diskussion über Reformen der AIS-Regularien). – La romaa kulturo en la pligrandiĝanta Eŭropo. (Die Roma-Kultur im wachsenden Europa). – Europäisierung von Hermannstadt, der europäischen Kulturhauptstadt 2007 (Eŭropizo de Sibiu, la eŭropa kulturĉefurbo 2007). – Ktp. (Usw.)

Ĉefprogramo de la 22a IF / Hauptprogramm des 22. IF: www.internacia-festivalo.de. Ĉiutage / Täglich 13:30 – 15 h: ILo für Anfänger mit Vorkenntnissen. // Paroliga kurso por progresintoj.

* Siegfried Piotrowski & Helmar G. Frank (Hrsg./komp.): *Europas Sprachlosigkeit / La senlingveco de Eŭropo*. KoPäd München 2002 (ISBN 3-935686-25-0), 186 – 187. Eŭropa Serio *Sennaciĝita Scienco*, volumo 5.

Bisher richtete sich das Programm der *Internationalen FestivaLe* **nur** an Sprecher der *Internacia Lingvo (ILO) de Doktoro Esperanto* und an ihre ILo-lernwilligen Begleiter. Es sah täglich 4 Zeitscheiben vor: 10 – 11:30, 13:30 – 15, 16:30 – 18 und 20 – 21:30 Uhr. Während ihnen bestanden Wahlmöglichkeiten zwischen je 2 – 5 Programmpunkten, die entweder keinerlei Sprachkenntnis voraussetzten (Konzerte, Tanz usw.), oder eine befriedigende Kommunikationsfähigkeit in ILo. Dies alles gilt auch für das Hauptprogramm des 22. IF.

Diesmal bieten AIS und Europaklub (EK) in einem besonderen AIS-EK-Raum ein paralleles Unterprogramm an, u. a. zur Erprobung eines übersetzungsfreien „*polyglotten Dialogs*“. Er wurde von Roland Posner* (Gründungspräsident der *Internationalen Semiotikgesellschaft*) vorgeschlagen und empfiehlt, in der aus irgend einem Grund bevorzugten Sprache zu antworten, die nicht die vom Ansprecher benutzten Sprache sein muss. Man nutze aber eine der Sprachen, die mutmaßlich alle Partner der jeweiligen Kommunikationssituation verstehen.

Diese Sprachenbasis ist für das AIS-EK-Unterprogramm eine minimale gemeinsame Untermenge der offiziellen Sprachen von AIS, EK, TAKIS und anderer teilnehmender mehrsprachiger Organisationen: **ILO** und **Deutsch**. Da mindestens 80–90 % der IF-Teilnehmer beide Sprachen befriedigend beherrschen und fast alle anderen die eine gut beherrschen und die andere zu lernen begannen, wird das Experiment höchstwahrscheinlich gelingen und zur Empfehlung einer solchen Kommunikationsform führen.

Hier einige vorgesehene Teile des zweisprachigen AIS-EK-IF22-Unterprogramms.